

La Progresanto

REDACTIE-
COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 111278

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADMINISTRATIE: G. J. DEGENKAMP, POSTBUS 8002, AMSTERDAM-W

EEN WOORD TOT ONZE CURSISTEN

Het elementaire leerboekje heeft u de kennis van Esperanto gebracht, of ge zijt althans nog met het bestuderen daarvan bezig. Wij nemen aan, dat ge nu tot onze medestanders behoort, en nu ook van uw kant zult ijveren voor verbreiding van Esperanto. Velen uwer hebben zich inmiddels al bij onze bond aangesloten; vele anderen zullen ongetwijfeld nog volgen.

Uw studie is echter nog niet ten einde. Wel is het met Esperanto niet zoals met een vreemde taal: dat op het eerste leerboekje een tweede volgt, en misschien nog een derde. Neen, het elementaire leerboekje bevat de gehele grammatica; is het boekje doorgewerkt, dan kent u alle taalregels.

Maar er is nog meer. Wel is Esperanto, vergeleken bij andere talen, eenvoudig, en gemakkelijk te leren, maar het is een taal, en als zodanig moet het in staat zijn alle schakeringen van de gedachte weer te geven. Op het leren van de taalregels volgt de praktische toepassing daarvan, mondeling in conversatie, schriftelijk in correspondentie en vertalen. Hierbij is een zekere leiding een vereiste.

Die leiding vindt u in ons studieblad „La Progresanto”. Maandelijks verschaft het u oefenstof ter vertaling. Uw vertalingen kunt u inzenden. Eventueel gemaakte fouten worden dan in een volgend nummer behandeld. Aan de kunst van vertalen is zelfs een afzonderlijke rubriek gewijd. Verder vindt u er artikelen in over taalkundige onderwerpen, besprekingen van Esperantowerken en een en ander over de geschiedenis en organisaties in onze beweging.

Natuurlijk is daar veel bij wat nog niet voor beginners is bestemd. Maar men is toch niet van plan beginner te blijven? Wat nu nog niet van pas komt, benutte men later. Jaargangen van L.P. behouden altijd hun waarde!

En wat vooral van veel belang is voor alle studerenden: ons blad verschaft u de gelegenheid vragen te stellen omtrent alles wat de taal betreft. De redactie is steeds bereid uw vragen in het blad te beantwoorden, in het Nederlands of in Esperanto, naar gelang ge wenst, zelfs schriftelijk, indien u daaraan de voorkeur geeft. De enige voorwaarde is, dat u dan een postzegel voor antwoord insluit.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuyt.

Vertalingen zende men vóór de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Postbus 8002, Amsterdam-W.

Opgave 2. Vertaal in Esperanto:

DE WOLF EN HET LAM.

Een wolf ontmoette een lam bij een beek. De wolf wilde het lam opeten. „Hoe durft gij het water troebel maken?” zei hij. „Ik kan het nu niet drinken.” „Het water stroomt van u naar mij”, zei het lam, „dus kan ik uw drinken niet bederven”. „Alles goed en wel”, zei de wolf, „maar gij hebt mij een jaar geleden belasterd”.

„Een jaar geleden was ik nog niet geboren”, zei het lam.

„Dan was het uw vader”, schreeuwde de wolf, en daarmee sprong hij op het arme, hulpeloze lam toe en at het op.

Vertaling van opgave 12.

Enfermita inter altaj, fortikaj¹⁾ bordomuroj, Vesper²⁾ fluas meze tra la malnova urbo. Ĉe la flanko, kie situas³⁾ la centro, larĝa vojo iras⁴⁾ laŭlonge⁵⁾ de tiu bordomuro. Apud tiu vojo antikvaj⁶⁾ fasadoj⁷⁾ leviĝas⁸⁾ al la ĉielo⁹⁾. Tie antaŭe loĝis komercistoj, riĉiĝintaj¹⁰⁾ en la komerco. En antaŭaj tempoj tie estis pli bele ol nun. Tiam oni ne vidis vaporŝipojn sur Vesper²⁾, nur velŝipojn. Ĉi tiuj lastaj aspektas multe pli interesaj. Nun tie albordiĝas multaj tirŝipoj¹¹⁾, kiuj alportas fiŝojn. La vojo nun estas plena per¹²⁾ ŝarĝaŭtomobiloj kaj ĉiaj aliaj veturiloj. Pri trankvila promenado laŭlonge⁵⁾ de la akvo ne plu estas parolo¹³⁾.

1) Juister dan *fortaj*; het verschil tussen beide woorden blijkt uit de volgende vertalingen: *forta* = krachtig, *fortika* = stevig, hecht. 2) Niet: *la Vesper*; voor eigenamen wordt geen lidwoord gebruikt. 3) Ook: *troviĝas, estas*. 4) Ook: *kondukas*. 5) Niet: *laŭ*; vergelijk: *ni iras laŭ tiu vojo* en: *la arboj staras laŭlonge de la vojo*. 6) Ook: *tre malnovaj*; niet: *praaj*; dit heeft betrekking op de oertijd. 7) Niet: *muroj*. 8) Niet: *direktas, wel: direktas sin* of *direktiĝas*. 9) Ook: *ĉielen* of *en la aero*. 10) Niet: *riĉiĝitaj*; de lijdende vorm van het deelwoord kan slechts bij overgankelijke werkwoorden voorkomen; *ili riĉiĝis*, dus moet een bedrijvend deelwoord gebruikt worden. 11) Ook: *trenŝipoj*. 12) Niet: *je*, wat vroeger na *plena* veel gebruikt werd. *Je* gebruike men slechts als geen ander voorzetsel toepasselijk is. Ook: *de*. 13) Ook: *ne plu eblas*.

FERIO AŬ FERIOJ.

K-do Chr. F. W. Sl. en U., skribas al ni: „K-do Kuyt tradukis *vacante per ferio*. Laŭ „Plena Vortaro” ĉi tiu vorto signifas *libera tago*; do la traduko de plurtaga libera tempo estas *ferioj*. Tio konformiĝas al la germana lingvo, el kiu oni ĉerpis la vorton *ferioj*, germane *Ferien*”.

Efektive, origine la vorto *ferio* signifas nur liberan tagon; praktike oni tamen preskaŭ neniam uzas *ferio* kun tiu senco, sed ĉiam kun senco de unu aŭ pli da liberaj tagoj; ĝi simple anstataŭas la antaŭe uzitan *libertempo*; kaj estas senutile kaj senrezulte nun reenkonduki la originan sencon, uzante la vorton plurale por pli ol unu tago. Oni rimarku, ke diversaj vortoj havas en iuj lingvoj pluralan senco, sed en Esperanto singularan: *cerbo, cerebelo, ŝelko, pantalono, pordo, intesto*.

Kaj kelkfoje plurala senco en iu lingvo iĝis singulara. La origina senco de la nederlanda vorto *agenda* estas plurala; ĝi nun estas singulara.

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: „Du el kvardek unu viroj.” Ĉu ne prefere: *du el la kvardek unu viroj?*

Resp.: Ambaŭ estas bonaj: Twee van 41 aŭ: Twee van de 41, sed la sencoj inter-diferencas.

EEN WEINIG GRAMMATICA VOOR BEGINNERS

Hoewel hetgeen hieronder volgt in de eerste plaats voor beginners is bestemd, kan het ook zijn nut hebben voor die gevorderden, die zich tot taak hebben gesteld begin-cursussen te leiden. Immers, een moeilijkheid zelf begrijpen is nog niet hetzelfde als anderen die moeilijkheid te verklaren, met voorbeelden toe te lichten en met hulpmiddeltjes zo duidelijk mogelijk voor te stellen.

DAT.

Ons woordje *dat* kan verschillende betekenissen hebben. Het kan twee volzinnen met elkaar verbinden als voegwoord (*ke*). Het kan een aanwijzend (*tio*, *tiu*) of een betrekkelijk (*kio*, *kiu*) voornaamwoord zijn. Het kan zelfstandig zijn (*tio*, *kio*) of bijvoeglijk (*tiu*, *kiu*).

Hoe zijn die verschillen voor den beginner die zich niet veel meer van de Nederl. grammatica herinnert, het gemakkelijkst te bepalen?

Om tot een oplossing te komen passe men de volgende hulpmiddeltjes toe:

1. kan men bij *dat* iets aanwijzen of ter verduidelijking tenminste een aanwijzend gebaar maken, dan is *dat*: *tio* of *tiu*.
 2. Twijfelt men in dit geval tussen *tio* en *tiu*, dan probeer men, of men achter *dat* een zelfst. naamw. kan plaatsen. Zo ja, dan is het *tiu*; zo neen, dan *tio*; b.v.: *Tiu infano estas kvarjara, sed tiu (infano) nur dujara. Tio (ne: tiu) estas ĝusta.*
 3. Kan men bij *dat* niets aanwijzen, en *dat* ook niet vervangen door *wat*, *welk*, *hetwelk*, dan is het een voegwoord (*ke*), b.v.: *Mi scias, ke li pravas.*
 4. Kan men bij *dat* geen aanwijzend gebaar maken, maar het woord wel vervangen door *wat*, *welk* of *hetwelk*, dan is het *kio* of *kiu*; b.v.: *La infano, kiu faris tion. Tio estas la nura, kion li scias.*
 5. Om te bepalen, of in dit laatste geval *kio* of *kiu* gebruikt moet worden, probeer men het voorgaande woord, d.i. het woord, waarop *dat* betrekking heeft, in het meervoud te plaatsen. Kan *dat*, dan wordt *dat*: *die*, en zal de vertaling *kiu(j)* zijn. Kan *dat* niet, dan is het *kio*.
- Men bedenke hierbij, dat in het Nederl. voor onzijdige zelfst. naamw. *dat* wordt gebruikt (*dat meisje*), voor andere zelfst. naamw. echter *die* (*die jongen*). In het meervoud wordt *dat* evenwel *die* (*die meisjes*).

Vul nu aan de hand van deze hulpregeltjes in de onderstaande zinnen in met *ke*, *tio*, *kio*, *tiu* en *kiu*. Volgens de tussengeplaatste nummers zullen we in het Maart-nummer de juiste woordjes geven.

Cu vi konas la nomon de — 1 kiabino? — 2 estas la libro, — 3 mi legis. Kiu faris — 4 verkaŝon, — 5 knabino aŭ — 6? Li diris, — 7 li ne ŝatas — 8 laboron. Mi ne kredas, — 9 — 10 estas vera. La laboro, — 11 ni faras por Esperanto. Konjunkcio (voegwoord) estas vorto, — 12 kunligas du propoziciojn (volzinnen). Kio estas — 13? Kiu estas — 14? Kiu estas — 15 knabino? — 16 estas la kajero, — 17 mi kunportis por — 18 infano. Cu vi scias, — 19 la dono, — 20 staras tie, apartenas al li? Tiu urbo kaj — 21 vilaĝo apartenas al — 22 lando. Li diris, — 23 — 24 estas eraro. Li certigis, — 25 — 26 estas ĝuste — 27 libro, — 28 li deziras. Kion li diris, — 29 estas vera.

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: „Kaj iam singardan dum nokta dormado.

Min ofte ekvekas sovaĝa kriado.”

Cu ne prefere *singarda*, ĉar adjektiva adverbaj komplementoj?

Resp.: Ne, *singarda* tie ĉi ne estas adj. adv. kompl. La signifo estas: *min, kiu estas singarda...*; *singarda* do estas simpla adjektiva kompl., kiu devas havi la saman kazon kiel la vorto, kiun ĝi komplementas. Adj. adv. kompl. estas klarigebla: *min, dum kiam mi estas singarda...*

Dem.: „Du viroj falis trans la bordon. Cu same bona *transborden*?

Resp.: Jes, *transborden* sonas eĉ pli flue. Sed supozeble tio devas esti *trans la ŝiprandon*, ĉar *bordo* = *oever*.

Dem.: „Kun granda sopiro li estas atendata hejme de sia patrino malsana.” Cu ne same aŭ eĉ pli bona: *hejmen*?

Resp.: Ambaŭ estas bonaj sed la sencoj interdiferencas: la patrino sopiras *hejme*, sed ŝi sopiras lin *hejmen*, t.e., ke li venu hejmen; la frazo do enhavas nenomitan agon kun direkto.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO.

Jac. Lem.

Opgave 2. Vertaal in Esperanto:

DE VIJGEN EN DE KWEEPEREN.

(Slot).

Toen Jozef in het vijandelijke kamp gekomen was, leidde men hem dadelijk voor Tamerlan; maar toen deze het ellendige geschenk, waarmede de Perzen hem trachtten te verbidden (*kormoligi, kompatigi*), zag, onstak hij in woede, riep een zijner soldaten en beval den ongelukkigen Jozef te knielen.

Wat zal er gebeuren? Hij voelde het, zijn leven hing aan een zijden draad. Zal de soldaat hem onthoofden? Zal hij hem met zijn zwaard doorsteken? Zal hij hem folteren?

Op bevel van den Mongool neemt de soldaat een der vijgen en werpt die met volle kracht (*per tuta sia forto*) op het blote hoofd van Jozef. Het sap van de overrijpe vrucht loopt langs de wangen van den ongelukkigen kerel, die, de armen over de borst kruisend, uitroept: „Allah zij geloofd!” Een tweede vijg valt op zijn kale schedel te pletter (*frakasigas*); weer roept hij: „Allah zij geloofd!” Bij de derde en de vierde vijg dezelfde kreet.

Tamerlan, die zich verwonderde over die zonderlinge volharding telkens dezelfde woorden te herhalen, vroeg hem, waarom hij dat deed.

„Ach, heer”, antwoordde de ongelukkige afgezant, „ik loof Allah, omdat ik de wens van mijn vrouw niet opgevolgd heb. Zij ried mij aan u kweeperen te geven; had ik dat gedaan, (dan) zou mijn hoofd ongetwijfeld verpletterd zijn, want onze kweeperen zijn erg hard”.

Tamerlan barstte tegen wil en dank in schaterlachen uit, schonk vergiffenis aan de medeburgers van Jozef en spaarde de stad.

Vertaling van opgave 1.

LA FIGOJ KAJ LA CIDONIOJ.

Tamerlan estis famkonata mongola militisto, kiu konkeris parton de Azio. Li estis sangavida kaj fanatika. Se iu urbo rezistis (malcedis) al (antaŭ) li, li mortigis ĉiujn enloĝantojn, virojn, virinojn kaj infanojn. Oni tamen povis kvietigi lian furiozon (koleron), prezentante al li donacojn: belan ŝtonon, bonan ĉevalon, kaj eĉ la prezentado de malpli valora objekto ofte plidolĉigis (malpliigis) lian kruelecon.

Iun tagon li estis kuratake okupinta iun malgrandan persan urbon. La malfeliĉaj enloĝantoj sciis kia sorto atendas ilin kaj decidis sendi kelkajn delegitojn al la furioza venkinto por klopodi (peni) kvietigi lian koleron.

Kiel ĉefon de tiu ĉi delegitaro oni elektis Josefon, la plej eminentan kaj plej riĉan civitanon de la urbo. Oni komisiis al Josefo en tiu kvalito prezenti al la mongolo ian donacon. Josefo interkonsiligis kun sia edzino pri la prezentota donaco kaj ĉi tiu diris al li: „En nia ĝardeno ni havas du specojn de fruktoj: figojn kaj cidoniojn; la figoj estas tro maturaj; ili jam estas preskaŭ putrantaj; ilin vi ne dece povas prezenti al Tamerlan. Prenu cidoniojn; ilin li certe volos akcepti”

Sed Josefo estis avara; li ignoris (malatentis) la konsilon de sia edzino, metis la figojn en korbon, kovris ilin per freŝaj folioj kaj ekvojaĝis. (Fino sekvos).

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: „Por unue saluti ŝian fraton” (Om het eerst. . .). Ĉu ne pli bone *unua*?

Resp.: Prave; *unue* = ten eerste; *unua* = het eerste, zijnde de eerste.

Dem.: „Tiuĵ Dioj, kiujn la poeto home paroligas.” Ĉu *home* estas bone uzita?

Resp.: Ne, ĉar en tiu ĉi frazo la ago *paroligi* okazus home; *home* koncernas la vorton *paroli*, ne *igi*; oni do devas diri: Tiuĵ Dioj, kiujn la poeto igas paroli home.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men vóór 10 Maart aan het red.-adres: Postbus 8002, A'dam-W.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto:

VOORJAAR.

Bij een strandwandeling in het voorjaar — dat is dus gedurende de tijd, dat het strand nog niet overdekt is met badende en zonnende bezoekers — kan men de natuur vaak betrappen, als zij in alle stilte bezig is, aan onze zeewering te bouwen. De aanlandige wind waait van het brede ebstrand de gedroogde, losgeraakte zandkorrels bij elkaar en achter of om elk voorwerpje, maar vooral om de schaarse plantengroei, die men op daartoe geschikte delen van het strand aantreft, vormen zich heel kleine duintjes. Meestal blijven ze niet bestaan, maar er zijn plaatsen waar dit wel het geval is (tussen Oostvoorne en Rockanje bijvoorbeeld, hier en daar ook op de Wadden-eilanden!) en dan kunnen ze gaan groeien tot echte duinen. Zo zijn al onze duinen gegroeid.

C. v. R.

Vertaling van opgave 14.

Vitro¹⁾ estas la plej elasta materialo, kiun konas la scienco²⁾. Ĝi tuj reprenas sian originan³⁾ formon, eĉ ĝis ĝuste antaŭ la momento, en kiu⁴⁾ ĝi atingos la rompiĝ-punkton⁵⁾. En la Owens-Corning-fabriko oni donis al mi⁶⁾ folion el⁷⁾ vitrodrapo⁸⁾, kiu estis ne teksita, sed premita⁹⁾ el tre delikataj fibroj. Ĝi sentiĝis¹⁰⁾ kiel¹¹⁾ la tavolo el¹²⁾ vatoj kuŝanta¹²⁾ funde en bombonujo¹³⁾. Mi ĉifis ĝin al¹⁴⁾ fortika¹⁵⁾ bulo¹⁶⁾, kiun mi faligis¹⁷⁾ el mia mano sur la tablon¹⁸⁾. Tuj la vitrodrapo reprenis sian antaŭan formon. Preskaŭ tremige estis vidi, ke posttestas eĉ ne (unu)¹⁹⁾ ĉifeto en ĝi.

Lloyd Stouffer.

1) Niet: *glaso* = glas om uit te drinken. 2) Ook: *sciencistaro*. 3) *Originala* betekent oorsponkelijk, in tegenstelling met namaak. 4) Ook: *kiam*, daar *momento* een tijds-aanduiding is. 5) *Rompi* is overgankelijk. Het glas zal niet zelf breken, doch stuk gaan door invloeden van buitenaf. 6) Niet: *min*; er volgt direct een lijd. voorwerp op. 7) *Da* drukt een hoeveelheid uit. De nadruk valt hier echter op het materiaal, waaruit het vel bestaat. 8) Ook: *vitro drapo*. 9) Niet: *presita*, d.i. afdrukken. 10) Ook: *sentis sin*. *Palpi* is (be)voelen. 11) Ook: *sentiĝis (tia)*, *kia*. 12) in het enkelvoud, omdat het betrekking heeft op *tavolo*. 13) Ook: *bombonskatolo*. 14) Ook: *je*. 15) Beter dan *rigida*. Een stevige bal. 16) Niet: *balo*, d.i. danspartij. Ook: *pilko*. 17) Niet: *lastis tali*. Het is een bewuste handeling. 18) Richtings-n. 19) Ook: *neniu*.

VOOR VERVOLGCURSUSSEN.

Wel beschikt onze bond over een keur van studiemateriaal voor begin- en vervolgcursussen, maar een boekje of iets anders ter afwisseling is altijd welkom. Een voor dat doel bijzonder geschikt geschrift is „Malgranda Revuo”, onder redactie van den letterkundige Stellan Engholm. Een aflevering van dit tijdschrift biedt leerzame en belangwekkende stof in voorbeeldige stijl, en is uitnemend geschikt zowel voor lees- als voor vertaal oefeningen. Elke aflevering is een studieboekje op zichzelf. Voor cursussen bestelle men dus een aantal exemplaren van eenzelfde nummer.

Door de gestegen koers van de Zweedse kroon moesten we gedwongen tot prijsverhoging overgaan. De prijs per nummer is thans f 0.75.

Libroservo, Postbus 8002, Amsterdam-W.

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: Kiuj estas la tradukoj de la jenaj birdonomoj en la jan. n-o de L.E.?

1. *limosa*; 2. *totano*; 3. *hematopo*; 4. *plataleo*; 5. *tadorno*; 6. *numento*.

Resp.: 1. Aŭ *limozo*, grutto (*Limosa melanura* aŭ *L. aegocephala*); 2. tureluur (*Totanus totanus* aŭ *T. calidris*); 3. scholekster, kliet (*Haematopus ostralegus*); 4. lepelaar (*Platalea leucoradia*); 5. bergeend (*Anas tadorna*); 6. wulp (*Numenius arquatus*).

Pri birdonomoj sekvos siatempe artikoleto en L.P.

HANDLEIDING BIJ HET VERTALEN

F. Faulhaber.

(Daŭrigo)

10. Flanke de la kamentubo pendis kvar longaj germanaj pipoj; tiuj apartenis en antaŭa tempo al la praavo de Jaĉjo. (. . . .; die waren nog van Jaaps overgrootvader geweest) =; ili iam apartenis al la praavo de Jaĉjo. Of: pipoj, kiuj iam apartenis, k.t.p.

11. Vi havas nun plenajn sitelojn da akvo; tiuj sendube sufiĉas. (. . . ., da's wel genoeg) =, tiom sendube sufiĉas.

12. Nenion vi diris al mi pri tio! Sed vi sendube parolis pri tio al viaj aristokrataj amikoj! Sed tiuj ne havigis al vi loĝejon! (Maar die verschaffen u geen woning!) = Sed ili ne havigis al vi loĝejon!

13. Kompaton — tiun li ankaŭ sentis pri tiu kompatinda Mina Albers. (Medelijden — dat voelde hij ook met die ongelukkige M.A.) = Kompaton — tion li sentis ankaŭ pri la malfeliĉa M.A. Of: Kompaton — kompaton li sentis ankaŭ, k.t.p.

14. „Mi petas, sinjorino“, diris Trees. Rigida rideto sin tordis ĉirkaŭ la buŝo de la maljuna virino ĉe tiu „mi petas“ (. . . . bij dat „alsjeblieft“). = ĉe la vortoj „mi petas“.

15. „Kiu estas tiu?“ vraagt iemand, nadat er gescheld is. (Wie is dat?) = Kiu estas? Of: Kiu sonorigis?

16. Oni serĉis la kaŭzon de la malapero de tiu kraĵono en tiu lulilo. (. . . . van dat potlood in die wieg) = de l' kraĵono en la lulilo.

17. Tiu okazo kun tiu ludglobo. (Dat geval met die knikker) = La okaz(int)ajo pri la ludglobo.

18. Ĝoja rideto montriĝis ĉirkaŭ la lipoj de H., kiam li memoris tiun tagon, kiam doktoro K. vizitis lian filon. (. . . . bij de herdenking van die dag, enz. =, kiam il rememoris la tagon, k.t.p.

19. Kes ricevis de sia patrino belan pomon. Tiun ili kune dividis. (Die deelden ze samen) = Ili kune dividis ĝin. Of:, kiun ili kune dividis. (Finota).

ESPERANTO EN LA ĈIUTAGA VIVO

H. Velthove.

Traduko el n-o 12a.

M.: Vi estas malfrue, mi opiniis (atendis), ke vi venos pli frue.

K.: La vagonaro malfruis preskaŭ unu horon. Pro kio, mi ne scias.

M.: Nu, ĉu vi havis sukceson? Aŭ ĉu la afero nuliĝis?

K.: Mi ankoraŭ ne scias. Oni promesis sendi respondan sciigon.

M.: Mi esperas, ke vi ricevos la oficon. Mi tre deziras tion.

K.: Ankaŭ mi. Tie en la proksimo de Hago oni loĝas pli oportune ol ĉi tie.

M.: Nu prave, arbaron kaj maron, kio pli dezirindas?

K.: Nu, finon, ni atendu. Se mi ne havos sukceson, mi devos rezigni.

M.: Kion vi diros morgaŭ al via mastro; ke vi estis malsana aŭ ĉu vi diros, ke vi iris por prezenti vin por ofico?

K.: Ne estas kialo por mensogi pri tio. Li povas scii la veron. Pri tio mi ne maltrankvilas.

M.: Sed, se vi havos fiaskon pri Hago, li scios, ke vi deziras ŝanĝi la oficon.

K.: Nu, ĉu gravas? Ja des pli favore. Eble li fine tiukaze pagos iom pli (da salajro).

M.: Li sufiĉe malavaras; ĉu vi kredas?

K.: Mi konjektas, ke li ne volonte malhavas min.

M.: Via aspiro — mia deziro.

K.: Kiel fartas la terpomoj? Mia stomako grumbblas pro malsato.

M.: Lasu (ĝin) grumbli. Ili tuj estos finkuiritaj. Mi dume pretigos la tablon.

K.: Ĉu ankoraŭ ne ĵurnalo? Gi malfruas hodiaŭ vesper.

M.: Tiukaze vi babilu kun via edzino. Vi senescepte ĉiam kaŝas la nazon post la ĵurnalon. Ĉu vi do havas nenion pli rakontindan? Vi ja iufoje spertas ion survoje? Vi neniam rakontas ion.

K.: Mi ne scias ion (rakont)indan.

M.: Ne, kompreneble ne. Sed al aliaj vi rakontadas senĉese.

KIO ESTAS VIA NOMO?

Het is altijd interessant recensies van eenzelfde boekwerk in verschillende bladen met elkaar te vergelijken. Wat de ene recensent beslist afkeurt, is volgens een andere te prijzen.

Zo vinden we in recensies van „Facile lerni Esperanton” in „Nederlanda Katoliko” en „Kristana Gazeto” de volgende tegenstrijdige opvattingen:

„In de zin „Kio estas la nomo de la knabino?” is het woordje *kio* zeer zeker foutief gebruikt. Dit had moeten zijn b.v. „Kiun nomon havas la knabino.” De Jong in N.K. „Cu „kiel nomiĝas. . . .” ne estas nederlandismo? Zamenhof neniam uzis la esprimon. „Kio estas via nomo?” Tio estas bona laŭ pure logika vidpunkto. Tamen: Zamenhof uzis: „Kia estas via nomo” kaj mi kvazaŭ sentas ke li pravas. La nomo ja estas preskaŭ ia kvalito.” De Hoog en K.G.

Ja, een netelig geval is het wel. Maar daarom moest de eersrte recensent zich liever niet zo beslist uitdrukken.

Kiel is ook o.i. niet juist, hoewel *kiel estas via nomo* een vorm van Zamenhof zelf is. Dat Zamenhof *kiel vi nomiĝas* veroordeeld zou hebben, betwijfelen wij sterk, trots de opmerking van s-ro de H., dat hij deze vorm nooit gebruikt heeft, hetgeen men het gemakkelijkst kan constateren in „Plena Gramatiko”, par. 84, Rim. II. Maar logisch is *kiel* zeker niet. Het gaat niet om de wijze van noemen of heten.

Is *kio* logisch? O.i. evenmin. Wel zal de vraag „kio estas nomo?” of „kio vi nomiĝas?” nooit misverstaan worden, maar het antwoord: de naam, sluit logisch niet aan op de vraag *kio*? Evenmin zal men op de vraag „kio vi estas?” ten antwoord krijgen een naam, maar b.v. een beroep, functie of daarmee gelijk te stellen woord.

Wat dan? *Kia*? Neen, het antwoord: de naam, is geen hoedanigheid. Op de vraag „kia estas via nomo?” zou b.v. wel een passend antwoord zijn „mia nomo estas longa, konata, franca” e.d.

Wij willen ons in dit moeilijke geval niet te beslist uitdrukken, maar geven graag een o.i. betere oplossing:

De vragen „wie is hij?” en „hoe heet hij?” zijn bijna synoniemen. Op beide volgt hetzelfde antwoord: een naam.

Die naam is noch een bijwoord (li nomiĝas tiel) noch een bijv. naamw. (li nomiĝas tia), maar een zelfst. naamw., dat correct alleen te vervangen is door het voornaamwoord *tiu*. (li nomiĝas tiu — li estas tiu). Vatten we de zaak zó op, dan krijgen we: Kiu estas via nomo? Kiun nomon vi havas? Kiu vi nomiĝas? Dit laatste analoog aan: Kiu vi estas?

VERBA MODO POST „KVAZAŬ”

Laŭ la signifo de la dependa propozicio la uzado de „us” post „kvazaŭ” estas tute logika, sed. . . . superflua, ĉar la vorto „kvazaŭ” mem sufiĉe esprimas la neverecon de la sekvanta frazenhavo. Uzante vian konkludon, mi ripetas: unu nek alia sekvo estas leĝo.

Ni estu prudentaj kaj singardaj. Zamenhof rekomendas kaj ni imitu lin, rekomendante nur tion, kio nia opinie estas bona.

Nia logiko neniam kondamnu la Majstron, ĉar aliaj en nia malsingardo klopodas trovi arugmentojn kontraŭ Esperanto. H. F. Roobeek.

Pro manko pri spaco ni devas prokrasti aliajn opiniesprimojn, cetere tre interesajn, ĝis sekvontaj numeroj. Rcd.

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: Kia estas la akcento en la vorto „superplena”?

Resp.: La ĉefa akcento estas sur *plen*, la dua (krom)akcento sur *per*, kvankam ĝenerale oni diras: *superplena*. Pri tiu ĉi temo siatempe sekvos artikolo.

Dem.: Ĉu la traduko „unue kaj ĉiam: Justeco!” taŭgas por: eens en voor altijd Rechtvaardigheid?

Resp.: Ne; ĝi devas esti: unufoje por ĉiam: Justo (Justeco).

Dem.: Kiel traduki „iemand recht doen wedervaren”; ĉu: pravigi iun, fari juston al iu, aŭ: fari justecon al iu?

Resp.: La plej taŭga traduko estas: fari juston al iu. *Justecon* oni ne faras; tio estas la eco, de iu, kiu justa. Pravigi iun = iemand gelijk geven.

Dem.: Kial pluralo en „kunigitaj vortoj, kiaj „superplena”?

Resp.: Ne devas esti pluralo, *kia* koncernas la singularan *superplena*, do sen *j*.

ĈU AKUZATIVO AŬ NE?

En „La Praktiko” (n-o 8—9, 1946) ni trovas sub „Lernu per eraroj” interesan atentigon pri uzo de akuzativo, laŭ nia scio ankoraŭ neniam traktita en instrua eldono. La aŭtoro kritikis la frazon: „Sacerdoto A.B. reorganizas la „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista”, dirante, ke la skribinto de tiu frazo erare ekzilis la akuzativan literon „n”. Liaopinie oni skribu: „... reorganizas la „Internacian Katholikan Unuiĝon Esperantistan”.

Pri tio ni ne samopiniis; kaj la afero ŝajnas al ni sufiĉe interesa por dediĉi al ĝi kelke da vortoj, tiom pli, ĉar koncerne ĝin regas en la praktiko ia haoso. Ni povas trovi ekzemple la jenajn formojn: oni fondis „La Espero”, „La Esperon”, „La Espero-n”, „La Espero”n kaj „La Espero”-n.

Ne ekzistas decida regulo en nia gramatiko por devige solvi tiun haoson. Ĉiu estas libera por uzi tiun formon, kiu liaopinie plej taŭgas. Por veni al kontentiga solvo ni tamen konsideru, ke la afero havas pli ol unu aspekton:

Se ekzemple la intercitile metita nomo konsistas el du substantivoj, ĉu ni tiam skribu: oni fondis „Paco kaj Juston” aŭ „Pacon kaj Juston”?

Kaj, se en la nomo troviĝas prepozicio, ĉu ni skribu: vidu „Tra la Labirinton”? Se jes, ni ŝanĝus la senĉon de la nomo, ĉar tiu n post „tra” estas direktoindika (door het doolhof heen). Kaj ĉu ni skribu: „Pacon per Justo” aŭ „Pacon per Juston” aŭ...?

Kaj, se la intercitila nomo estas neesperanta kaj iumotive netradukenda, ekzemple: E. de Wahl kreis „Occidental” (ĉu „Occidentalon”?). Aŭ: oni rekonstruis la detruitan (butikon) „Galleries Modernes”?

Certe, ni povas forlasi la citilojn, kiel la aŭtoro en L.P. prave aldonas. (En la kritikita frazo: ... reorganizas la „Int. Kat. Unuiĝo Esp.” ekzistas ankoraŭ io alia forlasenda: la artikolo, ĉar I.K.U.E. estas propra nomo, kiu ne postulas la artikolon.) Sed ankaŭ tiukaze ni ne povas uzi akuzativon, ne formante monstraĵon: li kreis Occidentalon; oni rekonstruis Gallerieson Modernesan (aŭ: Modernan?). Kaj el la frazo: oni fondis „Pacon kaj Juston” oni ne povus konkludi, ĉu temas pri unu aŭ du societoj.

Ni proponas alian solvon:

En tiaj esprimoj oni konsideru la propran nomon ne kiel pasivan objekton, sed kiel adjektivan adverban komplementon ĉe nomita aŭ nenomita objekto. Oni komparu: Li fondis „La Espero” = Li fondis la societon „La Espero”, kio signifas: Li fondis la societon, nomitan (= kiu estas nomita) „La Espero”.

Ĉi tiu solvo estas tute anlogia al:

Ni uzas la lingvon Esperanto = Ni uzas la lingvon, nomitan Esperanto. Kaj efektive: uzo aŭ neuzo de citiloj neniel ŝanĝas la aferon.

Fine ni eĉ inkludas supozon, ke la aŭtoro en L.P. pravigos nin. Li diras: „La skribinto de ĉi tiu frazo ekzilis la gravan kaj necesan literon „n” de la akuzativo. Verŝajne li opiniis, ke inter la cithokoj tiu litero povas forresti”. Nu, verŝajne ankaŭ la aŭtoro en L.P. opinias, ke tiu litero povas forresti inter cithokoj, ĉar... li ja skribas: „... necesan literon „n” de la akuzativo”! Ellasu el tiu frazo la vorton „literon”; ĉu tiam la aŭtoro skribus „necesan „n”” aŭ: „necesan „non”? Pri tio ni tre scivolas. La literon n ni ja prononcas *no*, do akuzative *non*!

Ni ripetas: la afero estas interesa kaj pro tio diskutinda.

VI DEMANDU — NI RESPONDOS.

Dem.: Ĉu „ $\frac{7}{8}$ dividitaj (aŭ dividita) per $\frac{1}{8}$ ”?

Resp.: Generale oni instruas singularon *dividita*; logike niaopinie tio devas esti pluralo, ĉar temas pri okonoj, dividitaj....

Dem.: Kiu diferenco inter „la plej multaj libroj” kaj „la plimulto de la libroj”?

Resp.: La plej multaj libroj = ekzistas generale (ne kune) multaj libroj, kiujn oni pense dividas en pli ol du grupojn, do *plej*, kaj, ĉar ili ne formas unu kvanton: *multaj*.

La plimulto de la libroj = temas pri certa kvanto da libroj, kiujn oni pense dividas en du grupojn: *pli*, kaj ĉar ili formas unu kvanton: *plimulto*.

Dem.: Kial „escepte li ĉiuj iris tien”? Ĉu ne: *escepte lin*?

Resp.: La frazo ne taŭgas; *escepte* signifus tie ĉi: bij uitzondering. Ĝi devas teksti: *escepte de li, ĉiuj*.... *Escepte lin* ni ne rekomendas; tio signifus proksimume: *esceptante lin* (hem uitzonderende).

Dem.: Kiel traduki „zakelijk”?

Resp.: Generale oni uzas *afer(eme)*, *koncize*, *objektive*. Pli taŭga vorto ne ekzistas.